

### ĈAPITRO III

#### POST STRANGA VETKURO SEKVAS STRANGA MUS-TEJLO.<sup>1</sup>

LA kunvenintoj sur la bordo prezentis tre strangan aspekton. Jen birdoj kun plumoj malordigitaj, jen bestoj kun felo algluiĝinta al la korpo: ĉiuj estis akvogutantaj, malkomfortaj, malagrablaj. Kompreneble la unua demando estis: kiamaniere resekiĝi? Ili interkonsiliĝis pri tio, kaj post kelke da minutoj ŝajnis al Alicio tute ordinara afero trovi sin babilanta kun ili kvazaŭ al personoj jam longe konataj. Ŝi havis longan argumentadon kun la Loro, kiu en la fino fariĝis malagrabla kaj volis diri nenion krom "mi estas la pli aĝa, kaj pro tio mi scias pli." Ĉar Alicio rifuzis konsenti al tio, ne sciante kiom da jaroj li havas, kaj ĉar la Loro absolute rifuzis doni tiun sciigon, restis nenio plu direbla.

Fine la Muso, kiu ŝajne estis aŭtoritatulo, ekkriis: "Vi sidiĝu ĉiuj, kaj aŭskultu *min*. Mi tre baldaŭ igos vin sufiĉe sekaj!"

<sup>1</sup> La vorto "tejl" prezentas al anglolingvanoj du diversajn ideojn, la ideon "vosto" kaj la ideon "rakonto."

### STRANGA MUS-TEJLO

21

Ili do sidiĝis, ĉiuj en unu granda rondo, kun la Muso en la centro.

Alicio fikse kaj atente rigardadis la Muson, ĉar ŝi havis fortan antaŭsenton, ke ŝi nepre suferos malvarmumon, se ŝi ne baldaŭ resekiĝos.

"Hm," komencis la Muso kun tre impona mieno "ĉu ĉiuj estas pretaj? Jen la plej bona sekigaĵo kiun mi konas. Silentu ĉiuj, mi petas!"

"Vilhelmo Venkinto, kies aferon la papo subtenis, baldaŭ subigis la anglan popolon, kiu pro manko de probatalantoj alkiutimiĝis dum la lastaj jaroj al uzurpado kaj venkiĝo. Edvino kaj Morkaro, grafoj de Mercio kaj Nortumbrio—"

"Ho, ve!" ĝemis la Loro, frosttremante.

"Pardonu" diris la Muso tre ĝentile (kvankam li tre sulkigis la brovojn), "ĉu vi parolis?"

"Ne mi" la Loro rapide respondis.

"Mi kredis ke jes" diris la Muso. "Sed mi daŭrigu. 'Edvino kaj Morkaro grafoj de Mercio kaj Nortumbrio fariĝis liaj partianoj, kaj eĉ Stigando la patrujama ĉefepiskopo de *Canterbury* trovis ĝin<sup>1</sup> konsilinda—"

<sup>1</sup> La aŭtoro tie ĉi kritikis (per la buŝo de l'Anaso) la anglan kutimon enmeti sen bezono la vortojn "ĝi" "ĝin" por turni la atenton al longa subjekta aŭ objekta frazeto, kiu sekvas: en la teksto "ĝin" = "iri kun E. A. . . . por proponi al li la kronon."